

ESPERANTO

sub la suda kruco

decembro 2022



La arto de
Artefarita
Inteligenteco
– paĝo 5



ESPERANTO SUB LA SUDA KRUCO

OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA KAJ NOV-ZELANDA
ESPERANTO-ASOCIOJ

Volumo 29[4] numero 148 decembro 2022

Presita de CMYK Colour Online en Melburno, Aŭstralio

Redaktisto: Terry Manley

Provlegantoj: Vera Payne, Donald Rogers

Kunordigisto: Jonathan Cooper

Kontaktadreso: esk@esperanto.org.au

AEA – ESK

GPO Box 2122

Melbourne, Victoria 3001

Australia

Abonoj kaj pasintaj numeroj

Esperanto sub la Suda Kruco estas sendata al membroj de la Aŭstralia Esperanto-Asocio (AEA) kaj Nov-Zelanda Esperanto-Asocio (NZEa).

Por informoj pri abonoj, pasintaj numeroj, kaj pri membriĝo al la asocioj:

AEA: www.esperanto.org.au / info@esperanto.org.au

NZEa: www.esperanto.org.au / esperantonewzealand@gmail.com

Kiel kontribui al Esperanto sub la Suda Kruco

Sendu eseojn, ideojn, rakontojn, esprimojn de vidpunkto, leterojn, desegnaĵojn, fotojn, kaj iun ajn alian originalan kontribuon al nia kontaktadreso, esk@esperanto.org.au

Artikoloj kaj originalaj en Esperanto kaj tradukitaj en Esperanton estas akcepteblaj. Sed NE sendu permaŝinajn tradukojn (ekzemple per Google Translate).

Limdato por kontribuoj por la sekva numero

15a de februaro 2023

La redaktistoj rajtas redakti, korekti, mallongigi kaj konformigi al la stilo kaj kutimo de ĉi tiu gazeto ĉiujn tekstojn antaŭ aperigo.

Por la opinioj aperantaj en ĉi tiu eldonaĵo respondecas la aŭtoroj. Ili ne necese spegulas la opiniojn aŭ de AEA aŭ de NZEA.

Copyright © 2022 AEA & NZEA – ĉiuj rajtoj rezervitaj
ISSN 2207-0087

SUR LA KOVRILO: Bildoj kreitaj de MidJourney per la vortoj

“photograph of young boy in red sweater, brown alien showing its glowing finger, highly detailed, photorealistic, cinematic lighting, tight crop” – Vidu paĝon 5. Pri aliaj fotoj, vidu paĝon 30.

ENHAVO

Antaŭparolo	04
La arto de Artefarita Inteligenteco	05
Dorothy May Enderby 1929 – 2022	11
Vizito al Vaŝingtono	13
Koloroj: scienco kaj arto	14
Konservu ĉiajn polenantojn	19
Piratoj kaj kibernetikaj trompoj	21
Marcel Leereveld, 105 jaroj	24
10a Azia-Oceania Kongreso	26

Antaŭparolo

TERRY MANLEY

Decembro progresas kaj ŝajnas, ke ni finfine gajnis sufiĉe da artikoloj por la lasta numero de la jaro. Dankojn al tiuj, kiuj daŭre subtenas la gazeton.

La estraro de AEA faras la lastajn aranĝojn por la kongreso en Melburno komencanta je la 6a de Januaro. Kun du elstaraj instruistoj – Katalin Kovats kaj Giles Thompson – plus interesaj prelegoj kaj ekskursoj, la programo promesas plaĉi al la ĉeestantoj.

Dum la jaro, la prezidanto de AEA, Sandor Horvath, daŭre aranĝis

prezentantojn por la monata prelegserio. Ekzemple: Jérémié SABIYUMA, *Afriko kaj Esperanto: La stato de la movado* (16an de oktobro 2022). Jérémié priskribas la historion de la Esperanto-movado en Afriko kaj strategiojn por sukcese helpi ĝin: youtu.be/umMtaQZRSNE

Do se vi ne kaptis ĝin aŭ aliajn prelegojn dum la jaro, vi povas spekti per YouTube iam ajn.




International House, Melbourne University, la loko de la Aŭstralia kaj Nov-Zelanda Kongreso kaj Somerkursaro, 6–13 januaro 2023

La arto de Artefarita Inteligenteco

JOANNE JOHNS (MELBURNO)

Artistoj ofte ŝatas pensigi homojn pri la limoj de kio oni povas nomi "arton". Ĉu blanka kanvaso estas arto? Jes, laŭ Robert Rauschenberg. Ĉu necesejo estas arto? Jes, laŭ Marcel Duchamp. Ĉu banano gluita al muro per duktoĉendo estas arto? Jes, laŭ Maŭrizio Cattelan. Verŝajne vi facile povas elpensi aliajn ekzemplerojn.



Robert Rauschenberg,
Blanka pentraĵo (1951)



Marcel Duchamp,
Fontano (1917)



Maurizio Cattelan,
Komediisto (2019)

La rapideco de la pliboniĝo de teknologio en niaj vivoj nekredeble akcelas (via poŝtelefono estas multmiliardoble pli rapida ol la plej bonaj komputiloj de la Apollo misio). Kaj kun nova teknologio venas novaj esplorindaj limoj en la mondo de arto.

En 2014 cifera artisto Kevin McCoy kreis la unuan Neanstataŭigeblan Ĵetonon (angle: Non-Fungible Token [NFT]). Vere klarigi kio tio estas bezonus apartan artikolon, sed plej simple ĝi estas maniero por leĝe posedi "originalan" version de cifera artaĵo, kvankam ĝi ankoraŭ povas esti libere kopiata. Subite la demando estis malpli "ĉu tio estas arto?" kaj pli "ĉu cifera artaĵo povas estis pli valora ol ĝiaj senkostaj, nedistingeblaj kopioj?" Jes, laŭ Pak kaj Bleeple, ciferaj artistoj kiuj ambaŭ vendis NFTojn kontraŭ pli ol kvindek miliardoj da usonaj dolaroj.



Sed jam ni havas eĉ pli novan teknologion kaj novajn kvereligajn aferojn. Ĉar nun ekzistas artefaritaj inteligentecoj, kiuj povas krei artaĵojn. Oni nur devas doni al ĝi sugeston (imagu: Zamenhof ĉe la Oskar-premioj) kaj ĝi donos al vi artaĵon. Do, ĉu arto kreita de Artefarita Inteligenteco (AI):

- a) estas 'vera' arto?
- b) estas ŝtelita de veraj artistoj (ĉar AI "lernas" de bildoj en la interreto)?
- c) estu permesata esti juĝata flank-al-flanke kun pli tradiciaj artaĵoj?

ĉ) bezonas iom ajn da lerteco de la homo kiu petas la artaĵon?

d) povus esti iel utila?

Kaj eble plej grave, ĉu ni ekde nun povas fidi iun ajn bildon kiun ni vidas?

Por respondi al ĉi tiuj demandoj, ni esploru unu AI-on kiu estas nuntempe populara pro ĝia artaĵoj: MidJourney (MezVojo). Ja estas aliaj sed mi ĝis nun ne tiom esploris ilin.

MidJourney estas atingebla per moderna tujmesaĝilo nomata Discord. Por interagi kun MidJourney oni sendas mesaĝon kiu komenciĝas per “/imagine prompt:” (imagi instrukcion). Poste oni tajpas kion ajn imageblan (krom vortojn nepermesatajn, kiuj eble kreus bildojn perfortajn aŭ seksajn). Ekzemple, por decidi ĉu artefarita inteligenteco povas krei ‘veran’ arton, vi mem juĝu: unu el la sekvaj estas AI-respondo al la instrukcio “virino en flava robo ludanta banĝon” kaj la alia estis la gajninto de la 2022 Brisbana Portreta Premio.



Kiu el ili pli proksimiĝas al ‘reala’ arto laŭ vi? La maldekstra estas la premiita artaĵo, de homa artisto (Darren McDonald), kaj la dekstra de komputilo. Ĉu vi rimarkis ke la AI donis al la virino tro da fingroj? Demandu al iu ajn artisto – manoj estas malfacilaj! Sed al mi ne gravas – mi scias kiun mi preferus havi sur mia muro.

Sed nun ĉar ni povas vidi la kvaliton – de kie ĝi venas? Artefarita Inteligenteco estas malpli ‘programita’ ol ĝi estas ‘dresita’. Oni donas al ĝi aliron al miliardoj da bildoj, por ke ĝi povu lerni, ekzemple, kio estas floro, kia estas la stilo de Van Gogh, kiom da fingroj ni havas (ne ses!). Tamen tie estas la problemo. En tiuj miliardoj da bildoj estas tiuj de homaj artistoj kiuj studis dum jaroj, elspezis monon, kaj multe laboris por fariĝi artistoj. Kaj nun ni povas uzi ilian stilon. Jen, maldekstre, Sunfloroj de Van Gogh, kaj dekstre, respondo al la instrukcio “sunfloroj, Van Gogh”.

Oni ne povus diri ke ili estas identaj, sed ili certe havas multajn similecojn. Laŭ mi, sufiĉe por maltrankviligi artistojn. Sed, tion dirite, homoj jam ŝtelas artaĵojn de la interreto sen eĉ ŝanĝi ion, do almenaŭ la AI klopodas krei ion iomete nova. Kaj kiel ĉiuj iloj, la celo venas de la uzanto, ne de la ilo.



Do se ni decidus ke Al-arto estas sufiĉe 'vera' kaj ni ne tute ŝtelas ion, ĉu ni rajtus gajni art-premiojn? Jes, laŭ la Ŝtata Foiro de Kolorado, kiu donis al Jason Allen la unuan premion pri la suba artaĵo, farite de MidJourney. Mi klarigu, ke kiam ili juĝis, ili ne komprenis ke ĝi estis kreita de komputilo, sed ili poste diris, ke eĉ se ili estus sciintaj, ili estus juĝintaj same.



La aliaj artistoj kompreneble estis sufiĉe koleraj. Kaj tio kondukas nin al la sekva demando – ĉu oni bezonas lertecon krei artaĵojn per AI? Mi dirus, jes kaj ne. Ne, ĉar estas facile ricevi belan artaĵon se vi estas sufiĉe sencela. Sed se vi jam imagas ion, kaj vi volas ke la AI kreu tion por vi... nu, ne ĉiam estas tiel simpla. Aparte se vi volas pli ol unu subjekto.

Jen kio okazas kiam mi klopodas rekrei ĉi tiun bildon el la filmo *ET la Eksterterano*.



a boy meets an alien with a glowing finger

photograph of young boy in red sweater, gaping at an alien, alien showing a glowing finger --v 4

photograph of young boy in red sweater, gaping at an alien, alien showing a glowing finger, highly detailed, photorealistic, cinematic lighting, tight crop --v 4

photograph of young boy in red sweater, brown alien showing its glowing finger, highly detailed, photorealistic, cinematic lighting, tight crop --v 4



photograph of young boy in red sweater staring at a brown alien showing its glowing finger, highly detailed, photorealistic, cinematic lighting, tight crop --v 4

two people, alien with long glowing finger, shocked boy in red jacket, photorealism, cinematic lighting, highly detailed, intricate details, headshot, 8k --v 4

two people facing each other, 45 degree camera, expressionless alien with long fingers, glowing fingertip, shocked boy, photorealism, cinematic lighting, highly detailed, intricate details, headshot, 8k --v 4

two people facing each other, 45 degree camera, expressionless alien with long fingers, glowing fingertip, shocked boy, photorealism, cinematic lighting, highly detailed, intricate details, headshot, 8k --v 4



Kiel vi povas vidi, mi provis ŝanĝi la sufloron por atingi mian celon sed la AI ofte konfuziĝis. Ĉu knaba eksterterano? Ĉu fingra eksterterano? Ho, du personoj. Ĉu ambaŭ portas ruĝan puloveron? Ĉu ĉi tio estas horora filmo? Mi kredas ke la kopirajto de la kreintoj de ET restas sekura, kaj jes, iom da lerteco estos bezonata por atingi specifan celon.

Do, ĉu la kreado de artaĵoj ĉi tiel povus esti utila? Kiuj uzos ĝin? Mia unua penso estas pri homoj kiuj bezonas bildojn por reklamoj, retpaĝoj, ktp (kaj revuoj!!). Kutime (ĉar vi ne rajtas simple preni ion ajn de la interreto) viaj nuraj eblecoj estas aŭ mem fari foton, aŭ pagu por aĉeti stokfoton. Sed nun vi nur devas peti al la AI doni al vi foton, kaj ĝi estas via por libere uzi.

Mi ankaŭ aŭdis ke artistoj ŝatas uzi MidJourney por ricevi novajn ideojn. Ĝia ideo pri kiel "pentri" fiŝon, ekzemple, povas esti malsimila ol la via. Kaj ĝi lernis pri komponado kaj lumigado de la plej bonaj artistoj en la mondo!

Sed mia plej ŝatata uzo de MidJourney venis tra mia bofratino, Cheryl. Ŝi laboras kun diverskapablaj homoj, kaj gvidas kelkajn grupojn por helpi al ili krei skulptaĵojn, teksaĵojn, lignaĵojn, sapon, kandelojn, kaj aliajn artaĵojn. Ŝi elpensis la ideon havi artekspozicion, kaj ke unu grupo povus krei bildstrian paĝon, kiel tiuj en grafika romano. Tamen, ŝi supertaksis la lertecojn de la grupo, kelkaj el kiu ne povas eĉ desegni je la nivelo de kvarjaraĝulo. Ŝi telefonis al mi, petante ideojn pri kiel helpi ilin. Mi tuj pensis pri MidJourney, kaj klarigis kiel ĝi funkcias.

Cheryl ŝatis la ideon. Ŝi jam sukcesis labori kun la grupo kaj havi de ili rakontojn kaj kelkajn desegnaĵojn. Kelkaj estis tre bazaj, kelkaj pli detalaj. Ŝi sendis ilin al mi, kaj mi eklaboris kaj uzis MidJourney por klopodi krei arton el iliaj ideoj.

La ideo por la suba estis io kiel "Viro kaj virino geedziĝas. Poste ŝi tranĉas lin en duonojn per tondilo. Lasta sceno: sango ĉie."




Ĉi tiu estis pli sciencfikcia, kaj mi uzis la vortojn “kalmara kosmoŝipo” por atingi la celitan formon. (Vidu la kontraŭan paĝon.)

•

Mi iom timis ke la grupo ne ŝatus la rezultojn, sed feliĉe, ĉiuj amis siajn artaĵojn. Laŭ mi, MidJourney estas tre bona ilo por doni al homoj kiuj ial ne povas krei artaĵojn (ĉu pro fizika, mensa, tempa aŭ alia nekapablo), la potencon havi siajn ideojn realigitaj.

Se vi ŝatus vidi la plej bonajn artaĵojn nun estantaj produktataj, iru al www.midjourney.com/showcase/

Se vi mem ŝatus provi (oni rajtas krei 25 bildojn senpage, post tio la kosto estas almenaŭ \$US10 monate), vi devos krei Discord-konton ĉe discord.com kaj aliĝu al la MidJourney-servilo ĉe discord.gg/midjourney



Dorothy May Enderby 1929 – 2022

TERRY MANLEY (ARMIDALE)

FRANCISKA TOUBALE (MELBURNO)

Dediĉita edzino de Keppel (mortis 2015). Amata amikino kaj kamarado de multaj. Dorothy ege mankos al amikoj kaj familianoj.



Dorothy (Dot) renkontis Kep en Kanbero en 1960. Ŝi estis bibliotekistino ĉe Chifley. Ili geedziĝis en 1964. Ili havas du infanojn Keir (filon) kaj Jo (filinon).

Daŭras sur paĝo 12 ➤

1974: La komputila epoko alvenis Biblioteko Chifley. Dorothy Enderby, Servisto de Legantoj

Pro familio kaj subtenado de la politika kariero de Kep, Dot rezignis kiel bibliotekisto en 1975. La fonan rolon de Dorothy en la kariero de Kep oni ne povas subtaksi. Kiam oni legas pri tia eminenta kaj sukcesa kariero, oni sciu ke, sen la apogo de Dorothy, tiuj sukcesoj ne eblus.

Dot kaj Kep tre ĝuis sian tempon en Balmain (Sidnejo), velŝipante sur la haveno, flugante aviadiletojn, kaj lernante Esperanton, la internacian helplingvon.

Restu pace, Dot.

Memoroj de Franciska Toubale

Mi renkontis Kep kaj Doroteon en 1993 kadre de la SAT-kongreso en Kazanlak (Bulgario). Doroteo akompanis Kep sed ne ĉeestis la kunsidojn aŭ partoprenis en la publikaj debatoj. Eblis interkonatiĝi inter la eroj de la programo kaj tiam ĝui la bonhumoron kaj ĝojvivon de Doroteo. Pro tio, ke Kep ludis gravan rolon en multaj

asocioj, li ne multe zorgis pri la ĉiutaga vivo, kiun Doroteo organizis por li. Ŝi diris ke ŝi ne volis lerni komputi ĉar tio estus al ŝi plia tasko, kiun Kep atendus ke ŝi plenumu por li.

Post la forpaso de Kep, mi vizitis ŝin kiam ajn mi estis en Sidnejo, sed en 2021 mi devis rezigni pri la flugo al Sidnejo pro KOVIM, kaj ni foje per telefono interparolis. Ni en kelkaj horoj "refaris la mondon". Kvankam ŝi ne plu ĉeestis la Esperanto-aranĝojn, ĉu en Aŭstralio, ĉu internacie, ŝi sekvis la evoluon de la movado kaj faris multe da demandoj pri la okazaĵoj. Mi ŝatis ke ŝi ne uzis eŭfemismojn por sin esprimi kaj ne timis nomi katon kato. En 2021 ŝi decidis fariĝi ano de SAT, kio, pro tio, ke mi estas la peranto, donis al mi plian kialon por ŝin kontakti.

Al miaj oreloj ankoraŭ sonas la rido de Doroteo. Tio estas al mi bela donaco.



Kep kaj Dot Enderby en 2013

Vizito al Vaŝingtono

DAVID RYAN (WELLINGTON, N-Z)

En decembro 2022 mi pasigis kelkajn tagojn en Vaŝingtono por ĉeesti ne-Esperantan kongreson. Temis pri mia unua vizito al la ĉefurbo de Usono.

La urbo multe impresis min. Estis granda plezuro vidi monumentojn kaj famajn konstruaĵojn, kiujn mi ofte vidis en la televido, en novaĵprogramoj aŭ en filmoj. Mi eĉ vidis la helikopteron de la Prezidanto kaj mi imagis ke li flugas super mi por reiri al la Blanka Domo. Mi vidis multajn monumentojn kaj memorlokojn pri militoj en kiuj aktivis usonaj militistoj, ekzemple en Koreio kaj Vjetnamio. Ŝajnas ke usonanoj ĝenerale havas grandan respekton por siaj militistoj kaj eksmilitistoj kiuj havas multajn privilegiojn, ekzemple rajton enaviadiliĝi antaŭ aliaj pasaĝeroj kaj rabatojn por eniri muzeojn ktp. Tio ne okazas en Nov-Zelando.

Mi restis en hotelo en urbcentra kvartalo kun ĉirkaŭe plejparte oficejoj

de registaraj instancoj. Tamen, mi vidis preskaŭ neniun surstrate, kaj la urbo estis ege trankvila! Mi demandis pri tio al vendisto en butikoj kaj li respondis ke verŝajne multaj homoj ankoraŭ laboras hejme.

En Vaŝingtono estas tiom da interesaj muzeoj. Ekzemple, mi vidis la aviadilon en kiu la fratoj Wright flugis la unuan fojon kaj mi vidis la lunoveturilon de Apollo 11 en kiu Neil Armstrong, Michael Collins, kaj Buzz Aldrin revenis al la Tero.

Nesurprize, ŝajnas ke la dua lingvo en Vaŝingtono estas la hispana. En muzeoj kaj bushaltejoj ktp, ofte estis informŝildoj en la hispana lingvo, kaj multaj hispanlingvanoj laboris en restoracioj kaj en mia hotelo.

Mi ege rekomendas viziton al ĉi tiu histori-riĉa urbo.



Statuo de Abraham Lincoln



Lunoveturilo de Apollo 11

Koloroj: scienco kaj arto

JONATHAN COOPER (GOSFORD)

Ĉiu lingvo (inkluzive de Esperanto) havas vortojn por koloroj. Iuj nur havas vortojn por nigro, blanko, varmaj koloroj kaj malvarmaj koloroj. Tamen, eĉ homoj, kiuj parolas la saman lingvon foje malkonsentas pri la koloro kiun io havas. Do, ni devus preterpasi tiujn argumentojn kaj pli bone kompreni la fenomenon de "koloro".

Koloroj en arto kaj sonoj en muziko paralelas unu la alian. Ambaŭ havas ondojn kaj frekvencojn: por koloroj, lumajn, kaj por muziko, sonajn. Krome, ambaŭ ne devas rilati al la "reala mondo"; ili povas esti abstraktaj, esprimantaj purajn emociojn.

Adiciaj kaj subtrahaj koloroj

Ekzistas du metodoj de kolor-miksado: adicia (miksado de lumoj) kaj subtraha


(miksado de pigmentoj, farboj aŭ filtriloj). Ĉiu havas siajn proprajn "primarajn kolorojn".

Vi verŝajne konas la subtrahan modon, per kiu bluo plus flavo faras verdon. Tamen en *adicia* kolor-miksado, flavo ne estas primara koloro, kiel la eksperimento en Bildo 1 demonstras. Ruĝo plus verdo faras flavon! (Miksi tiujn kolorojn kiel *farbojn* produktus malbrilan brunon.) La plejmulto el ni vidas tiun fenomenon ĉiutage, sur televida aŭ komputila ekrano, kvankam ni kutime ne rimarkas ĝin.

Bildo 2 montras kiel la du metodoj estas malsamaj. Rimarku, ke la subtrahaj primaraj koloroj ne estas ruĝo, flavo kaj bluo, sed cejanbluo (en la angla "cyan"), fukfino ("magenta") kaj flavo ("yellow"). Vi eble aŭdis pri CMYK¹ aŭ vidis kvar kolorajn



Bildo 1: Ruĝa lumoj plus verda lumoj faras flavan lumon



Bildo 2: La du manieroj de kolor-miksado

kvadratojn ĉe la rando de presita paĝo aŭ sub la kovrilo de kartona pakaĵo.

La fenomeno funkcias kiel en Bildo 3. Imagu, ke ni havas du filtrilojn: fuksinan kaj flavan. Blanka lumo, konsistante el lumoj blua, ruĝa kaj verda, brilas sur la fuksinan filtrilon. Fuksino ensorbas verdon, do nur blua kaj ruĝo pasas tra la fuksina filtrilo, sur la flavan. Flavo ensorbas bluan, do nur ruĝo pasas tra la flava filtrilo. Tial, en subtraha kolor-miksado, fuksino plus flavo faras ruĝon. Vi mem povas provi tion per farbo aŭ inko (Bildo 4). Tamen, tio nur *praktike* necesus se oni havus tre striktan farbo-buĝeton sed ankoraŭ dezirus miksi kiom eble plej multe da koloroj.

Tri dimensioj de koloro

Ĉiu koloro havas tri dimensiojn. Tamen tiuj "tri dimensioj" ne rilatas al la tri dimensioj de spaco. Simple signifas, ke estas tri manieroj per kiuj oni povas ŝanĝi kolorojn:

- **Spektrokoloro** (en la angla "hue")
- **Pureco** ("saturation"), kaj
- **Heleco** ("brightness")


Spektrokoloro de koloro estas la koloro al kiu ĝi plej proksime rilatas en la kolor-rado (aŭ ĉielarka spektro). **Pureco** de koloro estas kiel proksima ĝi estas al ties spektrokoloro, malgraŭ kiom hela aŭ malhela ĝi estas. Do, la koloroj en Bildo 5 havas la saman spektrokoloron (t.e., bluan) sed malsamajn purecojn. **Heleco** de koloro estas kiom da lumo ĝi reflektas. Do la koloroj en Bildo 6 havas la saman spektrokoloron (denove, bluan) sed malsamajn helecojn.

Tamen, la tri dimensioj ne estas sendependaj unu de la aliaj: ĉiu spektrokoloro havas sian propran "naturan" helecon. Kaj ŝanĝi helecon (de ĝia natura valoro) aŭtomate malplialtigas la purecon.

Kiel miksi kolorojn

La paŝoj de kolor-miksado estas: unue, trovi la spektrokoloron; due, la purecon; trie, la helecon; kaj eble kvare, reĝustigi la purecon.

Mi antaŭe deklaris, ke la tri dimensioj de koloro ne egalas la tri dimensiojn de spaco. Tamen, se oni volas mapi ĉiujn



Bildo 3: Kolor-filtrado




Bildo 4: Miksado de flava kaj fuksina inko



Bildo 5: Aro da bluoj kun gamo de purecoj



Bildo 6: Aro da bluoj kun gamo de helecoj



Bildo 7: La kolor-arbo de Munsell

eblajn kolorojn, oni povas uzi tri-dimensian modelon. Ekzistas multaj modeloj, sed unu el la plej konataj estas la kolor-arbo de Munsell (Bildo 7).

Spektrokoloro estas la pozicio ĉirkaŭ la centra spino.

Pureco estas la foreco de la spino.

Heleco estas la alteco, montrita per la ciferoj sur la spino. La spino mem estas la griza gamo, de 0 (nigro) ĝis 10 (blanko).

Koloro en arto

Ekzistas tri bazaj manieroj de koloro en arto. La unuaj du estas la **simbola** kaj la **naturalisma**. Bildo 8 montras la simbolean modon. Ekzemple, oro simbolas la ĉielon, aŭ paradizon, kaj ultramaro simbolas la Madonon.



Bildo 8: Sano di Pietro, Madono kaj Infano kun Sanktuloj Hieronimo, Johano la Baptisto, Bernardo kaj Bartolomeo, ĉ. 1450–81. AGNSW



Bildo 9: Frederic Leighton, Bobenante la fadenon, ĉ. 1878. AGNSW



Bildo 10: Charles Conder, La varmaj sabloj, Mustafa, Alĝero, 1891. AGNSW

Bildoj 9 kaj 10 montras la naturalisman modon. Tamen ekzistas du tipoj de naturalismaj manieroj: **loka** kaj **ricevita**. Loka kolorado (vidata en Bildo 9) estas pentrita la kolorojn kiel ili aperas sub "idealaj", aŭ "neŭtralaj" kondiĉoj. Rimarku la ombrojn: Ili estas simple pli malhelaj versioj de la surfacoj sur kiuj ili ĵetiĝas.

Ricevita (aŭ "atmosfera") kolorado estas pentrita la kolorojn, kiel ricevita de la okuloj, dependante sur kondiĉoj de lumo kaj atmosfero. Rimarku la ombrojn en Bildo 10: Ili estas violkoloraj (kontraŭaj de la varma, flaveca lumo de la suno, kaj eĥante la reflektitan bluan de la ĉielo).

Do, samaj lokaj koloroj eble malsamas sub malsamaj kondiĉoj.

La fama franca impresionisto Claude Monet faris multajn seriojn de la sama temo. Eble la plej fama (sama temo, sama vidpunkto) estas la Katedralo Rouen. (Serĉu "monet rouen cathedral" en Google: [google.com.au/img/ghp](https://www.google.com.au/img/ghp))

Estas baze tri manieroj, per kiuj koloroj povas aperi malsame en ricevita kolorado:

1. Se la lum-fonto havas koloron (ekz-e, Bildo 11).
2. Se lumo reflektas de unu surfaco sur alian (ekz-e, Bildo 12). Tio fakte estas speciala okazo de numero 1.)
3. Se lumo devas pasi tra atmosfero (ekz-e, Bildo 13).

La tria kolor-modo en arto estas la **esprima**. En tiu modo, koloroj ne estas kapriĉe elektitaj, sed distordataj, por esprima efiko. Ekzemple, Paul Gauguin (Bildo 14) plialtigis la purecon de ĉiu koloro, por krei senton de magia fantazio. Aliaj artistoj foje plialtigas la helecon de ĉiu koloro², aŭ "movas" ĉiun koloron al specifa spektra koloro³.

Resumo

Ekzistas du manieroj de kolor-miksado: adicia kaj subtraha.



Bildo 11: Giuseppe Pennasilico, La fino de sonĝo, ĉ. 1908. AGNSW



Bildo 12: Pierre Bonnard, Memportreto, ĉ. 1938-40. AGNSW

Ekzistas tri manieroj de koloro en arto: simbola, naturalisma kaj esprima.

En la naturalisma modo en arto, koloroj povas esti lokaj aŭ ricevataj.

Ricevitaj koloroj povas esti influataj per reflektado, kolora lumo aŭ atmosfero.

Ekzistas tri manieroj de koloro: spektrokoloro, pureco kaj heleco.



Bildo 13: Clarice Beckett, Vespero, Vojo St Kilda, ĉ. 1930. AGNSW

Bildo 14: Paul Gauguin, Tahitaj virinoj, 1891. Musée d'Orsay



Artistoj povas distordi kolorojn esprime per ŝanĝado de spektrokoloroj, pureco, kaj heleco.

Piednotoj

1. **CMYK**: En la angla, **C**yan, **M**agenta, **Y**ellow kaj **blacK**. Nigro estas uzata ĉar fuksino, flavo kaj cejanbluo kune praktike ne faras veran nigran.
2. Ekz-e, la aŭstraliano Arthur Murch: esperanto.org.au/murch
3. Ekz-e, la aŭstraliano Russell Drysdale: esperanto.org.au/drysdale

Konservu ĉiajn polenantojn

DONALD ROGERS (WELLINGTON, N-Z)

En la lastaj jaroj homoj konstatis, ke la mielabeloj suferas diversajn malfacilaĵojn, do oni emas instaligi ĝardenojn, eĉ ĉe la supro de altaj konstruaĵoj, eĉ en grandaj urboj. Oni ankaŭ mastrumas mielabelojn tie por poleni la florojn. Tamen oni nun rimarkas, ke estas problemoj pri tio.

La okcidenta mielabelo (*Apis mellifera*) ne estas en danĝero de tuta formorto. Aliflanke aliaj polenantoj, t.e. aliaj specoj de abeloj, burdoj, vespoj, muŝoj, papilioj, birdoj kaj vespertoj, estas en danĝero. Multaj el tiuj polenantoj malplimultiĝas tra la mondo. Tamen ili estas malpli minacataj en la urboj, ol en la ĉirkaŭa farmlando.

La kialo estas, ke urboj enhavas multajn taŭgajn por abeloj habitatojn, kun relative malplia uzado je pesticidoj kaj amasoj da floroj en ĝardenoj, parkoj k.a. Tio plaĉas al la sovaĝaj polenantoj ĝis alvenas amasoj da mastrumataj mielabeloj konkursante kontraŭ ili por nektaro kaj poleno, kaj donante al ili malsanojn kaj parazitojn. En Londono ekzemple estas nesufiĉaj floroj por la nombro da mielabeloj tie mastrumataj. Same en Svislando.

Abelujoj ankaŭ minacas al florplantoj. Multaj plantoj kune evoluis kun specialaj polenantoj, kaj ili ne prosperas kiam mielabeloj ŝtelas ilian nektaron sed ne



Burdo (Bombus terrestris) importita el Britujo



Rondkapa maskita abelo (Hylaeus rotundiceps) Aŭstralio



Malgranda indiĝena abelo (Lasioglossum sordidum) Nov-Zelando



Plastra abelo (Leioproctus fulvescens) Nov-Zelando

plenumas la taskon disvastigi la polenon. Oni emas kuraĝigi abelbredadon sen ia scienca bazo. Tia “verdlavado” inkludas la instaladon je “abelhoteloj” por sovaĝaj abeloj, kiu ne estas dependinda metodo provizi habitaton por sovaĝaj solaj abeloj. Mi havas tian abelhotelon en mia ĝardeno, sed malmultaj sovaĝaj solaj abeloj uzas ĝin.

Necesas ŝanĝi agrikulturajn sistemojn por esti malpli damaĝemaj al sovaĝaj polenantoj, kaj limigi la senregan abelmastrumadon en urboj. Mielabeloj ankaŭ estas tre efikaj je polenado de specifaj trudherboj, kiu ŝanĝas la ĝeneralan plantan ekosistemon. Multaj

tiaj trudherboj estas tre invadaj, do tio ne estas dezirinda.

Almenaŭ 100 000 specioj da bestoj polenas florojn. La plejmulto estas insektoj, sed almenaŭ 1500 specioj da birdoj kaj mamuloj ankaŭ estas polenantoj. En Aŭstralio ili polenas flugante, glisante aŭ grimpante. Plantoj havas florojn kun brilaj koloroj kaj forta parfumo por allogi insektojn. Por allogi noktajn papiliojn aŭ vespertojn plantoj uzas blankajn florojn kiuj malfermas nokte kaj fortan parfumon. Plantoj kiuj allogas birdojn produktas multan nektaron kaj emas havi ruĝajn petalojn.

Nov-Zelando havas 28 speciojn de indiĝenaj abeloj, el kiuj 27 estas endemiaj. Aŭstralio havas ĉirkaŭ 1500 speciojn de abeloj.

Indiĝenaj abeloj estas ĝenerale malgrandaj kaj malhelaj, kaj ĉiu abelino demetas ĉirkaŭ dek ovojn en nestotruo en la tero aŭ en kava planta tigo. Ŝi lasas iom da nektaro kaj poleno por la idoj. Indiĝenaj abeloj furaĝas ĝis nur cent metroj for de siaj nestotruoj.

Nov-Zelando ankaŭ havas 12 speciojn de neindiĝenaj sovaĝaj abeloj, kiujn oni importis aŭ intence aŭ akcidente. La plej konataj estas la burdoj kiuj utilas por poleni ruĝan trifolion (multe uzata en paŝtejoj) kaj kivifruktojn, bluajn berojn kaj tomatojn.

Ni konsciiĝu pri la esenca rolo de polenantoj konservi nian bonsanon, kaj pri la bezono konservi la diversecon

de la polenantoj. Kvankam mielabeloj estas gravaj por agrikulturo, ili ankaŭ malstabiligas naturajn ekosistemojn, konkursante kun indiĝenaj abeloj, el kiuj iuj estas minacataj. Laŭ konservada vidpunkto, indiĝenaj abeloj multe pli bezonas subtenon.

Referencoj

Julia Kasper, *New Zealand's native bees, quiet lives of desperation*, blog.tepapa.govt.nz/2021/02/01/new-zealands-native-bees-quiet-lives-of-desperation

Graham Lawton, *A sting in the tail*, New Scientist, 21 May 2022, p 28.

en.wikipedia.org/wiki/Pollination

Alison McAfee, *The problem with honey bees*, Scientific American, 2020, www.scientificamerican.com/article/the-problem-with-honey-bees

Piratoj kaj kibernetikaj trompoj

TREVOR STEELE (ADELAJDO)

Vi legos nun rakonton pri naiveco kaj bonŝanco kaj malbono.

La komenco ŝajnis sufiĉe "senkulpa". Mi ricevis telefonvokon de virino kun hinda (pakistanaj? Mi ne distingas) akĉento. Ŝi informis min, ke mia abono ĉe Amazon estas renovigenda kaj ke oni debetis min je \$99.99. Hej, kio? Mi neniam abonis ion ĉe Amazon... Ŝi informis min, ke se mi ne volas daŭrigi kiel kliento de Amazon, mi telefonu specifan numeron.

De tempo al tempo aperas strangaj debetoj en niaj bankokontoj. Kutime temas pri bagatela sumo, sed nu, mi ne volis pagi \$100 pro io, kion mi neniam uzas. Do mi telefonis la numeron por protesti. Juna viro kun hinda (pakistanaj?) akĉento

kaj agrabla voĉo montris komprenon de mia situacio, kaj proponis helpi min nuligi tiun pagon. Li multfoje menciis la sumon \$99.99, kiun oni redonos al mi, kaj li gvidis min "krozi" al diversaj retpaĝoj, kaj ŝajnis, ke tre baldaŭ la problemo estos solvita (kial mi ne kontrolis niajn kontojn por vidi, ĉu tie estas debeto de \$99.99?). Sed tiam la junulo kun la agrabla voĉo informis min, ke bedaŭrinde estas ia teknika problemo, ke oni povas tuj repagi al mi \$30, kaj la ceteran sumon \$69.99 estos pagota, kiam la obstaklo estos forigita. Mi diru al li, en kiun konton li pagu.

Tio ne estas tre kontentiga, li konfesis, kaj li diris, ke li pludonos min al la spertulo ĉe Amazon pri tiaj aferoj. Iom surprizis

min, ke mia nova konversaci-partnero same parolas kun hinda (pakistana?) akĉento, sed nu, multaj kompanioj uzas la lertajn kaj malmultekostajn homojn de tiu sudazia duonkontinento. La Amazonulo bedaŭris informi min, ke la problemo estas, ke iu "pirato" aŭ "kodrompisto" eniris mian komputilan sistemon, kaj do necesas pludoni min al specialisto pri kibernetika sekureco. Mi estis jam pli ol horon ĉe la telefono, sed konsentis paroli kun tiu specialisto.

La specialisto, kiu havis akĉenton (divenu kian) montriĝis unue kompatema. Li informis min, ke mi estas unu el multaj viktimoj de pirato, kies identecon oni konjektis, sed ĝis nun ne eblis kapti lin dumfare. Sed la specialisto, kiu nomis sin (malgraŭ la akĉento) Mark Roberts, havis identigan numeron XXXXXX (bedaŭrinde mi ne memoras tiun detalon) ĉe ACIC. ACIC? Mi neniam aŭdis pri ĝi, sed evidente ĝi estas iu aŭstralia komisiono kontraŭ io.

Mark diris, ke li forte suspektas, ke la malbonulo loĝas en Dayton, Ohio (li montris mapon de la regiono) sed iel direktas sian araneaĵon de fieco el Singapuro. Tio iom konfuzis min, sed Mark montris al mi foton de viro, kies vizaĝo ŝajnis esti el iu polica galerio de suspektataj murdintoj. Al la demando de Mark mi respondis, ke ne, mi neniam vidis tiun sinjoron. Mark plue klarigis, ke ankaŭ Interpol suspektas la homon. Mi devis promesi paroli al neniuj, eĉ ne mia edzino, kaj Mark montros al mi la Interpol-mesaĝon pri tiu sendube krima homo. Mi iomete nehoneste promesis (prisilenti ion de mia edzino estas neimageble). Mark montris al mi iun tre oficialaspektan paĝon kun ia usona emblemo (Interpol? Nu, eble Interpol dancas laŭ iu usona melodio).

Tio ne estis la fino de la intimaj informoj. Mark diris, ke la aŭstralia

branĉo de internacia kibernetika sekureco aparte komisiis lin, Mark, kun la tasko aranĝi areston de tiu fiulo, kiu jam ŝtelis \$30 000 000 de senkulpaj aŭstralianoj. Ĉu mi konsentas helpi en tiu nobla projekto kaj protekti sennombrajn civitanojn de Aŭstralio? Mi estis flatata de tiom da atento sed iomete skeptika. Mark do montris al mi paĝon de iu sekreta sekcio de la aŭstralia registaro, kun la nomo de Mark Dreyfus supre. Estis tamen io stranga: en la teksto estis pluraj eraroj en la angla. Kio? Ĉu la nova registaro konsistas el duonanalfabetoj?

Mark plue klarigis, ke la plano estas, ke mi sendu monon al Singapuro – ne mian propran monon, sed \$30 000 de lia sekcio – kaj kiam la viro venos ricevi la monon, la loka polico arestos lin. Ĝuste kiel tio funkcios, ne estis tute klara al mi. Cetere, Mark informis, oni suspektas, ke multaj bankdungitoj estas parto de tiu internacia rabista bando. Pasintsemajne oni arestis bankmanaĝeron kaj oficiston en... e, kie vi loĝas? Mi respondis, ke en Adelajdo. Jes, Mark daŭrigis, oni arestis ilin en Sidnejo, do vi eble ne aŭdis pri tio.

Nun mi faris eraron, kiu povintus esti multekosta. Mark diris, ke li metos \$30 000 en unu el miaj kontoj, sed li devas havi la numeron de tiu konto. Li petis, ke mi malfermu la paĝon de mia interreta banksistemo. Mi hezite obeis, sed iom suspektis. Mark petis min decidi, en kiun konton meti la \$30 000. Tamen li mem decidis, ke li metos en specifan konton. Li petis min pacienci, ke mia ekrano nigriĝos dum kelka tempo. Pasis minutoj, kaj estis jam mia kutima horo por tagmanĝi. Mia ekrano refoje lumiĝis kaj jen! En unu konto aperis \$30 000 – sed kiel debeto! Kaj eĉ pli strange, la saldo restis la sama kiel antaŭ la enmeto de tiuj \$30 000. Naïve, mi informis Mark, ke la mono devas esti

en la kredita kolumno. Ho jes, li faris la necesan ŝanĝon – sed ankoraŭ la saldo restis neŝanĝita!

Mark diris, ke evidente tiuj kontoj estas ĉe la Nacia Banko NAB, kaj li ordonis al mi iri tuj al la plej proksima NAB-filio kaj sendi la monon al Singapuro al iu Mo Zixing (adreso donita, ĉiuj necesaj detaloj de la banko provizitaj). Mi respondis, ke mi ne havas aŭton, ke la banko estas kelkajn kilometrojn for, kaj krome mi volas ion manĝi kaj poste doni lecionon per Zoom al unu el miaj lernantoj. Mark fariĝis ĉiam pli ordonema: Sinjoro, necesas, ke vi iru kiel eble plej frue al tiu banko. Se ne, ni ne kaptos la krimulon.

Tiam li instrukciis min, kion mi faru en la banko. Unue mi devas demandi, kiom da mono estas en mia ĉekkonto. (Cetere, mi devis ankaŭ demandi la nomon de la bankdungito, kiu eble estas ano de la internacia krimbando). Mi devas tiam transpigi la \$30 000 el la alia konto en la ĉekkonton, kaj tiam sendi al la ĉekkonto al Mo Zixing. Se la dungito suspektas ion kaj demandas, ĉu mi konas Mo Zixing, mi diros, ke jes, li estas mia bofilo (cetere, mi ne havas filinon); jes, mi konas lin 20 jarojn, kaj lastatempe li havas financajn problemojn, kaj do mi volas helpi. Mi parolu iom arogante: tio faras bonan impreson.

Mark postulis, ke ni aktoru la scenon: li kiel la bankoficisto kaj mi kiel mi. Nun mi fine sciis, ke se estas iu pirato, Mark estas li... kune kun la bando de hindakĉentaj "Amazon-oficistoj". Sed mi humile ludis la rolon de mi en la banko, sed poste diris al Mark, ke mi ĝuis nian konversacion (eble 2-horan), kaj mi konsilis lin plibonigi sian fraŭdaĵon – ekzemple, lerni skribi seneraran anglan kaj meti monon en la ĝustan kolumnon, kaj ne postulu, ke malsata homo tuj kuru al fora banko.

Mi metis finon al nia ĉarma interŝanĝo, kaj ripetfoje Mark vane telefonis. Mi rimarkis, ke la landa kodo de lia telefono estas 64, tiu de Nov-Zelando, ne tiu de Aŭstralio, 61, malgraŭ liaj asertoj, ke li "operacas" en Melburno.

Mi telefonis al NAB kaj rakontis pri la trompoprovo, kaj oni donis al mi la retadreson de [scamwatch.com.au](https://www.scamwatch.com.au). Mi tuj pludonis al tiu adreso ĉion, kion mi sciis pri Mark kaj liaj kunuloj.

Do tiun tagon mi sidis dum vanaj horoj ĉe telefono. Sed mi ne perdis monon. "Mark" aliflanke perdis horojn de sia valora tempo en vana klopodo akiri mian monon.

PS: Nekredeble! Mi ĵus finskribis la supran tekston, kiam mia telefono tintis. Virina voĉo (kun hinda aŭ pakistan akĉento) informis min, ke mia abono al Amazon estas renovigenda...



Marcel Leereveld, 105 jaroj

HEATHER HELDZINGEN (MELBURNO)

Marcel naskiĝis en la jaro de la morto de Zamenhof, 1917, en Amsterdamo. La gepatroj kiuj estis operamantoj nomis lin Marcel pro la artisto en La Bohemo.

Kiam Marcel estis dekkelkjarulo lia avo instigis ĉiujn gefilojn kaj genepojn lerni Esperanton per la radiolecionoj en la katolika radiostacio. Marcel kaj liaj patro kaj fratino daŭrigis la studadon. En 1934 li membriĝis al unu el la dekok amsterdamaj kluboj de la nederlanda Laborista Esperanto-Asocio. La sekvan jaron, li biciklis al Parizo por

tie partopreni en la kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda. Tiu kongreso estis la lasta vizitata de Lanti, la inicianto kaj de SAT kaj de PIV. Marcel aniĝis al la Karl-Marksa, kontraŭ-Lenina Spartacus Ligo, kaj dum pluraj jaroj antaŭ kaj post la milito, redaktis ĝian Esperantan gazeton Klasbatalo. En 1936 Marcel dum kvin monatoj bicikle ĉirkaŭvojaĝis tra Francujo, preskaŭ ĉiun nokton gastigate ĉe membroj de SAT kaj aliaj esperantistoj. Dum tiuj kvin monatoj li vizitis kaj paroladis en multaj Esperanto-kluboj kaj renkontis tie kaj en kongresoj plurajn konatajn kaj multajn nekonatajn esperantistojn, i.a. Gaston Waringhien, kaj en Lyon, Lydia, unu el la filinoj de Zamenhof.

Antaŭ kaj post la milito Marcel vizitis plurajn Esperanto-kongresojn de SAT kaj de la nederlanda Laborista Esperanto-Asocio, kaj poste, el Aŭstralio, kelkajn UEA-kongresojn, plurfoje partoprenante

en la programo. Intertempe li sukcesis en la plej alta de la Akademias ekzamenoj, kaj li trapasis ekzamenojn, krom la nederlandan, ankaŭ en la lingvoj franca, germana, angla, itala, hispana, kaj lernis la danan, malnovgrekan, indonezian kaj Latinon.

En 1952 li kun sia esperantista edzino, Alida, kaj iliaj du infanoj, elmigris el Nederlando al Aŭstralio, invititaj de la Melburna Esperanto-Klubo. Post kelkaj monatoj da ĉiaspekaj manlaboroj, li eniris en Geelong College por instrui tie



la francan lingvon dum du jaroj. Post tio li akceptiĝis ĉe la kvakera lernejo en Hobarto kiel instruisto por la franca kaj germana lingvoj, kaj poste sukcesis enkonduki Esperanton kiel devigan lernfakon en la sepa kaj oka klasoj. Intertempe li estis stariginta la Hobartan Esperanto-Klubon kaj poste sukcesis, kun la helpo de Ralph Harry, enkonduki Esperanton kiel fakon en la universitaton.

Marcel forlasis, tiun lernejon post kvin jaroj kaj akceptis postenon de ĉefinstruisto por lingvoj en Caulfield Grammar School, en Melburno. Tie li instruis la germanan kaj reenkondukis la francan kaj Latinon, poste enkondukis la hispanan kiel devigan en la elementa lernejo, kaj poste enkondukis Esperanton. Li restis tie ĝis sia emeritiĝo en 1981.

Dum la 1970aj jaroj kaj longe poste, li kun Alida vojaĝis dum la tri lernejaj



ferioj tra la tuta mondo, ofte vizitante esperantistojn kaj klubojn. En multaj landoj ili vojaĝis du- aŭ trifoje aŭ pli; en Indonezio dekdufoje. Ili estis membroj de la Pasporta Servo kaj tiel gastigis konatajn samideanojn. En la kadro de AEA li estis tre aktiva, plurfoje vicprezidanto kaj dufoje prezidanto, kaj estis ĉefo de la ekzamenkomitato dum multaj jaroj, enkondukante tri novajn ekzamenojn, la bazan, la mezan, kaj la altan.

Tiuj novaj ekzamenoj estis tre popularaj, kaj okazigitaj en ĉiuj somerkursaroj dum multaj jaroj. Li instruis en multaj somerkursaroj, komencante en 1993 en Adelajdo, kaj organizis kelkajn; inter aliaj li tutsole sukcese organizis la kongreson kaj somerlernejon en la jaro 2007 en Hobarto, sen ia helpo. En la jaro 2007 la tiama estraro de AEA eksigis lin kaj aliajn kiuj malsamopiniis pri la ŝanĝo de asocio al kompanio kaj pri la uzado de la mono de AEA.

Intertempe Marcel finis sian tricentpaĝan libron pri la tuta gramatiko de Esperanto, *Lingvaj Resondoj*, nun haveblan ankaŭ elektronike. Renato Corsetti opinias ke eble ĝi anstataŭigos la Plenan Analizan Gramatikon de Waringhien kaj Kalocsay. Se vi volas havi kopion bonvolu viziti **esperanto.com.au**.

En 1964, kiam mi unue lernis Esperanton, Marcel kaj Alida instruis ĉe la melburna klubo. Estis kun granda surprizo

en 2003, kiam Ivan kaj mi remembrigis al la klubo post jardekoj, ke Marcel kaj Alida daŭre instruis kaj gvidis la kunvenojn per siaj kutimaj entuziasmo kaj energio. Marcel estis dum multaj jaroj prezidanto aŭ vic-prezidanto de la melburna klubo kaj gvidis kursojn kaj instruis al ni la ĝustan uzadon de nia bela lingvo.

En 2008 Ivan kaj mi vojaĝis kun Marcel kaj Alida al Eŭropo kaj specife al Germanujo kaj Nederlando, kie ni partoprenis en la Universala Kongreso en Roterdamo.

Krom amanto de Esperanto, Marcel estas amanto de operoj kaj vidis centojn da ili. Li tre interesiĝas pri aliaj artoj kaj multe vizitadis pentraĵajn ekspoziciojn en- kaj eksterlandajn. Li senĉese laboras en sia granda kaj bela ĝardeno kaj eĉ aktivas kontraŭ McDonald's en apuda urbeto kaj tiel iĝis fama en Usono.

Li daŭre verkas gramatikajn artikolojn por Aŭstraliaj Esperantistoj kaj dum multaj jaroj estis teamano por la Esperanta radioelsendo de 3ZZZ.

Ni ĉiuj estas tre bonŝancaj ke ni havas Marcel kiel amikon, instruiston, helpanton kaj bonkoremulon en nia vivo. Mi esperas ke li daŭrigos en sia grava laboro gvidi nin en la plibonigo de nia scio pri la bela lingvo.

Gratulojn atingi vian 105an naskiĝtagon. Vivu longe Marcel!

10a Azia-Oceania Kongreso de Esperanto, en Busano, Sudkoreio

STEPHEN EPSTEIN (WELLINGTON, N-Z)

Saluton al ĉiuj membroj de AEA kaj NZEA. En novembro mi havis la ŝancon ĉeesti mian unuan Esperanto-konferencon, la 10an Azia-Oceania Kongreson de Esperanto, en Busano, Sudkoreio. Tio estis bonega sperto. Mi volas esprimi mian koran dankon al Korea Esperanto-Asocio pro la organizado de tiel agrabla kaj sukcesa kongreso kaj al NZEA pro subteno.

Antaŭ ol mi parolos pri la konferenco mem, eble estos utile por mi diri iom pri mia propra engaĝiĝo kun kaj Esperantujo kaj Koreio. Mi eklernis Esperanton antaŭ 35 jaroj, kiam oni proponis kurson de

Esperanto en mia universitato. Sed kvankam mi lernis la gramatikon kaj akiris sufiĉan vortprovizon tiam, mi neniam havis realan konversacion en Esperanto, eĉ ne unufoje, kaj do ne plu studis ĝin post kiam la kurso finiĝis. Mi pensas, ke mi eĉ ne sufiĉe faris por diri, ke mi kabeis.

Sed kiam la pandemio komenciĝis, mi bezonis mian propran metodon por konservi min mense sana, ĉar estis neeble vojaĝi: mi iĝis multe pli engaĝita al la studo de multaj lingvoj, kiujn mi lernis dum mia vivo. Iun tagon en 2021 (kaj mi ne estas tute certa, kiel ĝi okazis), subite



Wei Zhang, Stephen Epstein, Karina Oliveira, Tatu Lehtilä, Ikuko Kitagawa, Hisasi Kitagawa, So Jinsu

venis al mi la ideo, ke verŝajne nun estas multaj utilaj rimedoj en la interreto por studi Esperanton. Eble mi povus revivigi tion, kion mi lernis.

Mi ĝojis trovi ke estas multe pli utilaj rimedoj ol mi eĉ imagis. Mi rapide legis *Teach Yourself Esperanto* denove, kaj mi rekomencis studi Esperanton tre aktive. Almenaŭ unufoje ĉiutage mi spektis filmetojn de esperantistoj, kiuj havas kanalojn en YouTube.

Mi baldaŭ havis kelkajn lecionojn kun Esperanto-instruistoj ĉe Italki por havi la ŝancojn paroli, kiuj evitis min antaŭ 35 jaroj. Post nelonge mi malkovris ankaŭ Ekparolu!, kio permesis al mi multe pli da parolpraktiko. Ĉirkaŭ tiu tempo mi trovis ankaŭ la Esperanto-grupon en Wellington kaj iel nun eĉ estas membro de la estraro de la NZEA.

Dum la lasta jaro Esperanto fariĝis grava parto de mia vivo. Eble surprize (sed ne surprize al samideanoj?), mi trovis ke Esperanto estas la pli utila lingvo dum

pandemio ĉar Esperantujo estas ĉie, ne laste pro la reto. Esperanto dependas malpli ol aliaj lingvoj de specifaj lokoj kaj landoj. Mi nun povas konektiĝi ne nur kun esperantistoj loke en Wellington kaj ĉirkaŭe en Nov-Zelando, sed preskaŭ ĉiun semajnfino mi babilas per Skajpo kun amiko en Brazilo, kiun mi unue renkontis kiam li servis kiel mia onklo ĉe Ekparolu!.

En mia vivo ekster Esperantujo, mi instruas en Victoria University of Wellington, kie mi direktas la Programon pri Aziaj Lingvoj kaj Kulturoj. Mi instruas kursojn kiel "Nov-Zelando kaj Azio" kaj "Nuntempa Azia Societo". Miaj propraj esploroj fokusiĝas al sudkorea socio kaj popola kulturo. Do la loko de la ĉi-jara Azia-Oceania Kongreso iĝis speciale interesa por mi.

Kompreneble la pandemio malhelpis vojaĝi eksterlanden, kaj mia lasta vojaĝo al Koreio estis en oktobro 2019. Tiom da jaroj estis mia plej longa tempo sen iri al Koreio ekde mia unua vojaĝo tien



Sesio por la internacia festivalo de junuloj



*Stephen
Epstein kaj
Ilia Dewi*

en 1986. Post tri jaroj, estis rimarkinda sperto reveni en Koreio. Mi ne rimarkis ĝis mi revenis kiom Koreio mankis al mi kaj kiom multe mi volis rekonekti min kun miaj amikoj kaj familio (t.e., la familio de mia edzino Mi Young) kaj kun la lando de Koreio mem.

La fino de oktobro/komenco de novembro ĉiam estis mia plej ŝatata tempo en Koreio kaj ĉi-jare ne seniluziigis min: la aŭtuna vetero estis mirinda, kaj la bunta foliaro estis eĉ pli bela ol mi memoris.

Rezulte de ĉio ĉi, estis precipe signife por mi povi denove viziti Koreion kaj kombini viziti familianojn kaj amikojn kun mia unua Esperanto-konferenco en Busano. Kvankam tute ne tiel bone konata kiel Seulo, Busano estas urbo kun ĉarmo, ennestiĝinta inter la maro kaj montetoj, iomete kiel mia hejmurbo Wellington.

Busano ankaŭ fariĝis konata kiel la loko de unu el la grandaj filmfestivaloj de Azio kaj estas unu el la urboj ofertantaj gastigi la Mondan Ekspozicion en 2030. La kongreso okazis en la Arpina, moderna

junulargastejo proksime de kelkaj el la ĉefaj turismaj vidindaĵoj en Busano. De la supra etaĝo estis bela vido de la haveno.

La kongresaj aranĝoj estis tre interesaj, kaj la ŝanco esti proksime al Dongbaekse kaj Haeundae aldonis specialan etoson. Kaj la doŝirakoj (urbĝuoj!) estis bongustaj. (Tio estas ŝerco por tiuj, kiuj parolas kaj Esperanton kaj la korean.)

La konferenco mem, kiu daŭris de la 3a ĝis la 6a de novembro, estis organizita kun entuziasmo. La unua nokto implicis "interkona kaj internacia vespero". Kiel ofte ĉe koreaj "glacirompiloj" (aŭ eble ankaŭ tio estas parto de Esperantujo?...), partoprenantoj devis fari ion iomete embarasan, kantante aŭ dancante. La konferencaj organizantoj petis nin porti nacian veston por ĉi tiu kunsido. Sed mi ne estis certa, kion la nacia kostumo por novzelandano signifas: ĉu ke mi devus porti T-ĉemizon "All Blacks" kaj kaŭĉukajn zoriojn?

Mi finis salutante la kunvenon kiel reprezentanto de nia lando. La organizantoj diris al mi, ke ili tre feliĉas havi la ĉeeston

de mi kaj de alia novzelandano Michael Bui. Laŭ ili, ni permesis la vorton "Oceania" esti en la konferenca titolo laŭleĝe. (Neniu el Aŭstralio ĉeestis.)

Unu el la pli interesaj prelegoj estis de Bak Giwan, kiu traktis la demandon "Esperanto: Ĉu eŭropa lingvo? Ĉu ankaŭ gramatika?" Li montris la kialojn, kial ni ne rigardu Esperanton kiel speciale eŭropan en ĝiaj gramatiko, sintakso kaj fonologio. Sed laŭ li finfine, oni devas diri, ke la vortstoko de Esperanto, kiu multe pli plene uzas la romantikajn kaj ĝermanajn lingvajn familiojn, estas multe pli facile por tiuj, kiuj jam parolas eŭropan lingvon, rapide lerni; tiu aparta aspekto estas gravega. Min frapis la nivelo de malfacilaĵoj, kiujn denaskuloj de la korea havas por akiri Esperanton ol denaskuloj, ekzemple, de la portugala.

La demografio de la ĉeestantoj ankaŭ estis interesa por mi. Estis proksimume 170 fizikaj partoprenantoj, el kiuj proksimume tri kvaronoj estis el Koreio kompreneble. La plej grandaj internaciaj grupoj estis de Vjetnamio kaj Japanio.

Estis ankaŭ 125 retaj partoprenantoj. La luktoj de Ĉinio kun la pandemio signifis, ke malmultaj el Ĉinio ĉeestis, sed la sesioj de la 4a Esperanto-Forumo de Ŝanhajo kaj Seulo povis okazi per Zoom-ligo, kaj estis inter la plej bone ĉeestitaj en la konferenco.

Mi ankaŭ trovis interese, ke la plej multaj el la koreaj esperantistoj estis de la tiel nomata "386-generacio". Tiu termino estis origine kreita en la 1990aj jaroj el la frua 386-komputilo. Ĝi reprezentas tiujn, kiuj tiam estis en siaj 30aj jaroj, kiuj frekventis universitaton en la 1980aj jaroj (kiam studentoj aktive protestis kontraŭ la milita diktaturo) kaj kiuj naskiĝis en la 1960aj jaroj. Kompreneble, nun estus pli konvene nomi ilin la 586 aŭ eĉ "686 generacio".

Samtempe estis ankaŭ multaj junaj koreaj esperantistoj ĉe la kongreso. Alia el miaj plej ŝatataj sesioj estis la internacia kultura festivalo de junuloj, en kiu multaj junaj esperantistoj faris mallongajn prezentojn. Esperanto ŝajnas havi promesplenan estontecon en Koreio.

Mi devas mencii tion, ke mia vojaĝo al Koreio koincidis kun tragedio. Ĉirkaŭ 150 homoj mortis en homamasa ondo dum Haloveno-festadoj en Itaewon, distrikto de Seulo konata pro sia nokta vivo. Kvankam neniu, kiun mi konas, estis vundita, mi havas amikojn, kiuj estis tie tiun vesperon, kaj mi estis ligitaj al homoj, kiuj estis pli profunde trafitaj de la tragedio. Tiu tre malĝoja evento ankaŭ kaŭzis la nuligon de la laŭplana artfajraĵo en Busano la sekvan semajnfino. La kongresorganizantoj esperis, ke la artfajraĵo estus la ĉefaĵo de la konferenco.

Sed tio estis la sola negativa aspekto de mia vojaĝo. Mi finu per pli feliĉaj pensoj: estis vere mirinde renkonti tiom da interesaj samideanoj. Mi precipe ĝuis la ŝancon renkonti aktivajn internaciajn esperantistojn kiel Tran Hoan, Ikuko Kitagawa, kaj Karina Oliveira. Karina devenas el Brazilo sed instruas la portugalan en universitato en Busano, kaj kiel lingvisto faras esplorojn pri Esperanto.

Estis aparta plezuro finfine renkonti persone Inhye Kim, kiun iuj el vi eble konas kiel Ella Koreio. Ella ankaŭ estis ĉe miaj onkloj ĉe Ekparolu! kaj ŝi havas kanalon en YouTube nomita EsperantoTV ([youtube.com/@esperantotv2948](https://www.youtube.com/@esperantotv2948)). Eble plej precipe por lokaj esperantistoj, mi havis ŝancon multe babili kun Ilia Dewi el Indonezio, kies bildo estas sur la kontraŭa paĝo.

Mi antaŭĝojas renkonti esperantistojn en Koreio estonte!

KONTRIBUU al **ESPERANTO**

sub la suda kruco



La limdato por la
venonta numero estas la
15a de februaro. Sendu
artikolojn, rakontojn,
enigmojn, receptojn,
fotojn ktp al
esk@esperanto.org.au -
ni bezonas vin!

Informo pri fotoj

5–10 Joanne Johns (per MidJourney)

5 Van Gogh, per Vikipedio

6 Brisbane Portrait Prize

7 Jason Allen (per MidJourney), Ŝtata
Foiro de Kolorado

8 *E.T. the Extra-Terrestrial*, Amblin
Entertainment, Universal Pictures

11 Biblioteko Chifley, ANU, Kanbero

12 Daniel Munoz/Guardian Australia

13 David Ryan

16 Jonathan Cooper, krom kolor-arbo
de Munsell: bazita sur

www.seamlessexpression.com

17, 18 Art Gallery of NSW

19 Musée de Orsay

20 Wikipedia

23 *Hacker* – Clint Patterson per
Unsplash (detalo)

24 Marcel Leerveld

25 Heather Heldzingen

26–28 Stephen Epstein

32 Ilia Dewi (el Indonezio) kaj Teofilo
Jose Maria de Jesus (el Orienta Timoro),
ĉe St Kilda dum la aŭstralia kongreso,
Melburno, 2015. Foto: Joanne Johns

Australian Esperanto Association

GPO Box 2122
Melbourne VIC 3001
Australia

esperanto.org.au
info@esperanto.org.au
(07) 4696 9293

Sandor Horvath | **President**
Jonathan Cooper | **Vice-President**
Heather Heldzingen | **Treasurer**
Joanne Johns | **Secretary**

Committee Members:
Terry Manley, Paul Desailly

AEA was established for the promotion, teaching, and use of the international language, Esperanto, in Australia.

AEA aims to make Esperanto available to help with intercultural understanding and harmony, and works to foster co-operation among Esperanto organisations with similar aims.



IBradley McDonald | **President**
Chris Krageloh | **Vice-President**
David Ryan | **Secretary/Treasurer**
Dave Dewar | **Assistant Secretary**

Committee Members:
Erin McGifford, Josuo Moss, Stephen Epstein

NZEA's vision is for everyone in New Zealand to recognise the value of Esperanto as an international language.

NZEA is one of the oldest Esperanto associations in the world, and is responsible for promoting Esperanto in New Zealand, providing learning material, and answering queries about the language.

New Zealand Esperanto Association

P.O. Box 8140
Symonds Street
Auckland 1035
New Zealand

www.esperanto.org.nz
esperantonewzealand@
gmail.com
0800 350 781

What is this?

Have you picked up this magazine by chance and are wondering what language it is? It might look a bit like Spanish, but it's actually Esperanto.

What is Esperanto?

Esperanto was specially planned and created as a neutral second language for people all over the world. So, if you come across someone from, say, Finland, you wouldn't have to speak Finnish and they wouldn't have to speak English.

Originally developed in the 1880s, Esperanto is currently experiencing a resurgence, with more and more people discovering and learning it online. It's spoken in over 100 countries and there are thousands of Esperanto clubs worldwide.

Esperanto is much easier to learn than any national language, because it was designed to be easy to learn. It's completely phonetic, and its grammar is logical and regular.

You can use Esperanto for travel, information, friendship, hobbies, and even business. The World Esperanto Association publishes a list of names and addresses of people who are happy to have you stay with them for free if you speak Esperanto.

The internet makes it easy to connect to Esperanto speakers in any country. Google, Facebook, Firefox and Linux all support Esperanto. There's an Esperanto version of Wikipedia, which has over 300 000 articles (more than the Hebrew version, for example).

Isn't English enough?

National languages like English give an unfair advantage to their native speakers. People who have studied English for over ten years still feel at a disadvantage when talking with a native speaker.

Interested? See the contact details on the inside back cover.

